# DU RIMARKINDAJ EKSPOZICIOJ EN PÍSEK

## RAKONTO DE LA LUMO

**Václav Lamr (1943-2020)**

Sub tiu titolo okazis inter 28.11.2023 kaj 14.1.2024 en Malgranda galerio de la ekspozicia kulturcentro Sladovna (Maltejo) impresa prezento el la pentra kaj grafika verkaro de la ĉeĥa artisto, poeto, verkanto de aforismoj kaj elstarulo de evengeliisma movado. Mi vizitis la ekspozicion la lastan tagon antaŭ malinstalado kaj renkontiĝis tie kun lia al mi jam konata edzino Marie, kiu dum sekva kafumado malkovris al mi nekonatajn detalojn pri lia vivo.




Václav Lamr naskiĝis 25.4.1943 en moravia urbo Litovel en medio de familio kun longa tradicio de ceramik-, kaj precipe kahelfarado, en kiu renkontiĝadis intelekte kaj kulture inspiraj gastoj. Ankaŭ lia samaĝa kuzo Aleš kun siaj tri filoj elektis artan profesion.

Origine pro politikaj kialoj li ne estis akceptita al studado kaj devis lerni masonistan metion. Nur poste li povis studi farb- kaj pentroteknikojn en Artmetia mezlernejo en Brno. Sekve li laboris kiel stukisto, teatra artisto, sed ankaŭ kiel flegisto kaj artterapiisto en la monaĥejo Želiv kaj en Habrovany. En la sesdekaj jaroj, i.a. post resaniĝo el grava malsano, li kristaniĝis kaj sian vivon dediĉis ankaŭ al misia laboro kaj diskonigo de la evangelia mesaĝo kaj Dia amo per netradiciaj manieroj.



Li prezentis siajn verkojn en diversaj lokoj de Ĉeĥio kaj Slovakio (i.a. en 2017 ankaŭ en Urba Muzeo kaj Galerio Svitavy) kaj dum kolektivaj ekspozicioj en Germanio, Britio, Francio, Norvegio, Usono k.a. Nemalmultaj liaj bildoj troviĝas en privataj kolektoj tutmonde.




Li ofte prezentas konatajn bibliajn rakontojn kun ĝenerala etika mesaĝo kaj simbolajn motivojn, i.a. kun akcento al repaciĝo kaj toleremo inter kristanismo kaj judismo. Liaj kompreneblaj verkoj kapablas tuŝi kaj inspiri malfermajn homojn sendepende de ilia mondkoncepto.



Kun Esperanto li konatiĝis komence de la 1990-aj jaroj dank' al Pavel Kleissner el la ĉeĥa KELI-sekcio de ĈEA. Li lernis la lingvon plejparte aŭtodidakte kaj korespondis kaj renkontiĝadis kun esperantistoj ne nur el kristana medio. Li revizitadis klubojn en Prago kaj Písek, partoprenis i.a. UKojn en Prago, Roterdamo kaj Nitra, kie li ankaŭ ekspoziciis siajn bildojn – same kiel dum la ĈEA-Kongreso en Pelhřimov (2016).





Václav Lamr kaj lia verkaro sendube meritas esti de ni esperantistoj neforgesita. Pliajn informojn kaj fotojn eblas ĉehlingve trovi en la retejoj lamr.estranky.cz kaj vaclavlamr.com kaj en Muzeum.esperanto.cz.

